WIKIPEDIA

Pikarda franca dialekto

La **Pikarda dialekto de la franca lingvo** (kelkfoje nun nomata "chtimi") estis parolata (kaj nun iomete plu restas kiel nuraj spuroj) en la regiono Pikardio, la departementoj Nord, Pas-de-Calais, Somme, parto de Oise kaj Aisne kaj eĉ parteto de Seine-Maritime kaj ankaŭ malgranda parto de Belgio ĉirkaŭ Tournai.
Dum la mezepoko, la pikarda posedis, kiel aliaj francaj dialektoj, literaturon uzitan ĉefe de Adam de la Halle kaj Conon de Béthune .

Dum la 19-a jarcento kelkaj aŭtoroj provis revivigi la dialekton, kiu estis nura popola idiomo, kiel beletran lingvon, pere de kanzonoj, poemoj, rakontoj, treatraĵetoj. Tiu ĉi emo ne tute malaperis en la 20-a jarcento, sed iĝas malpli kaj malpli, ĝenerale reduktita al komikaĵoj, dum la efektiva ĉiutaga uzo de la dialekto malaperadas. Homoj parolantaj centprocente ĝin estas nun ege raraj, pli ofte oni aŭdas homojn en kies normfranca lingvaĵo intermiksiĝas **spuroj** de la pikarda.

pikarda	
Picard	
Areo kie estas parolata la pikarda	
Parolata en	Francio (Pikardio), Belgio
Parolantoj	700 000
Denaskaj parolantoj	???
Skribo	latina alfabeto
Lingva statuso	4 severe endanĝerigita
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	sen valoro
ISO 639-2	pcd
ISO 639-3	pcd
SIL	PCD (http://www.sil.org/iso639-3/documentation.asp?id=pcd)
Glottolog	pica1241
Angla nomo	Picard
Franca nomo	picard
Vikipedio	

Enhavo

Listo de pikardlingvaj aŭtoroj
Ekzemplo de Pikarda dialekto
- PIKARDA
- Prononchelpo
- Franclingva traduko
- Esperantlingva traduko

Bildoj
Eksteraj ligiloj
- Sonekzemploj

Listo de pikardlingvaj aŭtoroj

- Alain Dawson, esperantisto
- Camille Desrousseaux
- Henri Georges

Ekzemplo de Pikarda dialekto

PIKARDA

Nou patois, ch'est l'manière qu'in dit nou contes
Ch'est de l'façon-là qu'in parlot tout l'mont'.
Ch'est l'langache ed'nou vieux, ed'nou z'aïeux
Et croïez-meu, y a pas d'quoi n'n'ête honteux!
.....
Nou patois i cante comme el'vint d'ichi,
Et chà ne s'comprind qu'avec des amis.
In l'parlot déjà à l'récréation
Pou faire bisquer ch'clerc et ses punitions.

(aŭtoro: Guy Dubois)

Prononchelpo

nu patŭa, ŝe l'manjer' k'i~ di nu ko~t'
ŝe de lfaso~ la ki~ parlo tu l'mo~t.
E kroje mÖ, j'a pa dkŭa n'n'et' o~tö!
....
nu patŭa i ka~t' kom el vi~ d'iŝi,
e ŝa nÖ skompri~ k'avek de zami
I~ l'parlot deĵa à l'rekreasio~
Pu fer biske ŝkler e se punisio~.
)

NB: ~ montras nazan vokalon

Franclingva traduko

Notre patois, c'est la manière dont nous disons ce qu'on a à dire
C'est de cette façon-là qu'on parlait nous tous.
C'est la langue de nos vieux, de nos aïeux
Et croyez-moi, il n'y a pas de quoi en être honteux!
.....
Notre patois il chante comme le vent d'ici,
Et ça ne se comprend qu'avec des amis.
On le parlait déjà à la récréation
Pour faire bisquer le maître et ses punitions.

Esperantlingva traduko

Nia loklingvo, jen la maniero per kio ni diras niajn aferojn.
Tiel parolis ni ĉiuj.
Jen la lingvaĵo de niaj maljunuloj, de niaj prauloj,
Kaj kredu min, ne indas honti pri tio!
.....

Nia loklingvo kantas tiel kiel la ĉi-loka vento,
Kaj tio kompreniĝas nur kun amikoj.
Ni parolis ĝin jam dum la lernejpaŭzo
Por spiti la instruiston kaj liajn punojn.

Bildoj

Eksteraj ligiloj

- pcd.wikipedia - Vikipedio en la pikarda (https://pcd.wikipedia.org/wiki/Accueul)
- TTT-ejo "ŝ'lanŝron" (http://lanchron.dyadel.net/home-esp.htm) (enkonduko Esperantlingve)
- *Dictionnaire picard* (http://www.lexilogos.com/picard_langue_dictionnaires.htm): "Pikarda vortaro", hejmpaĝo pri la pikarda lingvo.
- Mapo de la pikardparolantaro (http://www.picard.free.fr/lgpic/geo.htm)
- TTT-ejo en la pikarda (el Retarkivo 2008) (https://web.archive.org/web/2008/http://chtimipicard.free.fr/rubrique.php3?id_rubrique=4)

Sonekzemploj

http://ches.diseux.free.fr/sons/d85.mp3 (ne trovebla)
ches.diseux.free.fr/diri/dir85.htm (el Retarkivo 2010) (https://web.archive.org/web/2010/http://ches.diseux.free.fr/diri/dir85.htm)
Centre de Ressources pour la Description de l'Oral (CRDO) (http://www.language-archives.org/language/pcd)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Pikarda_franca_dialekto&oldid=6265746"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 21:44, 1 feb. 2018.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.